Justinus Kerner,

# Eltrinku la vinon

*tradukita de Ludwig Emil Meier*

Eltrinku la vinon, foriras nun mi;
adiaŭ, karuloj, en hejm' tie ĉi!
Adiaŭ, vi montoj, gepatra tegment',
perforte fortiras min freŝa la vent'.

La suno ne restas ĉe sama stelar',
trans landojn ĝi migras kaj super la mar'.
La ondoj ne haltas ĉe sia la bord',
la ventoj forkuras muĝante kun fort'.

Kun nuboj rapidaj la bird' flugas for,
al landoj tutfremdaj ĝin tiras la kor'.
Kaj tiel junulo migremas sen fin',
simila al tero, al sia patrin'.

Salutas lin sonoj konataj trans mar',
de l'hejm' alfluginta kantanta birdar';
Lin tuŝas de floroj intima odor',
la ventoj patrujaj alblovas ĝin for.

La birdojn li konas el sia hejmland',
la florojn li iam kolektis, amant';
kaj amo lin sekvas, sekreta mister',
lin faras enhejma sur fremda la ter'.

*Traduko de la Germana poemo "Wohl auf noch getrunken " de* Justinus Kerner *(∗1786-09-18 – †1862-02-21) en Esperanton de* Ludwig Emil Meier *(∗1847-02-16 – †1919).*

*Arg-1030-2090 (2014-05-30 10:37:35)*

*Pri la tradukinto vidu la vikipediejon* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Emil_Meier`*. La esperantigon de tiu ĉi kanto mi, Manfred Retzlaff, trovis en la libreto "Internacia Kantaro", eldonita en 1922 de la eldonejo Ferdinand Hirt u. Sohn en Lepsiko (Leipzig), Germanio.*

Justinus Kerner,

# Wohl auf noch getrunken

Wohl auf noch getrunken den funkelnden Wein!
Ade nun, ihr Lieben, geschieden muß sein.
Ade nun ihr Berge, du väterlich Haus,
Es treibt in die Ferne mich mächtig hinaus.

Die Sonne, sie bleibet am Himmel nicht stehn:
Es treibt sie durch Länder und Meere zu gehn.
Die Woge nicht hastet am einsamen Strand,
die Stürme sie brausen mit Macht durch das Land.

Mit eilenden Wogen der Vogel dort zieht,
und singt in der Ferne ein heimatlich Lied.
So treibt es den Burschen durch Wald und durch Feld
zu gleichen der Mutter, der wandernden Welt.

Da grüßen ihn Vögel, bekannt überm Meer,
sie flogen von Fluren der Heimat hierher;
Da duften die Blumen vertraulich um ihn,
sie trieben vom Lande die Lüfte dahin.

Die Vögel, die kennen sein väterlich Haus.
Die Blumen einst pflanzt´ er der Liebe zum Strauß
Und Liebe die folgt ihm, sie geht ihm zur Hand:
so wird ihm zur Heimat das fernste Land.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Justinus Kerner *(∗1786-09-18 – †1862-02-21), publikigita 1809.*

*Arg-1030-2089 (2015-01-27 23:51:52)*

*Tiu ĉi kanto-teksto troviĝas en* `http://www.volksliederarchiv.de/text1950.html`*. La kanto estas aŭdebla en* `http://www.youtube.com/watch?v=nT5CaiMH3uU`*. La muziknotoj troviĝas en* `http://www.markomannenwiki.de/index.php?title=Wohlauf!_noch_getrunken`*. Pri la verkinto vidu la vikipediejon* `http://eo.wikipedia.org/wiki/Justinus_Kerner`*.*